



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44000 NANTES, Francujo

JARABONO :

P. BABIN

Jarabono : 60 fkoj

13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes


P.C.K. Nantes : 2.813.61

1985 - 1


(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

EN TIU NUMERO

vi povos legi pri...



« ...Kvazaŭ migranta mondo el karno kaj ostoj... »



...Kimrujo, kie kasteloj kaj historiaj domoj abundas.

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

Esperanto tra la mondo	A.Frangeul
Bonvenon al Kimrujo	H.Chapman
La hind-eŭropaj lingvoj	D.Moirand
La faŭno de l'pratempo	H.Röllinger
La aventuroj de Fifi Stultul	Mik
Pri niaj literaturaj trezoroj	J.LePuil
Por via distro	
Gramatiko per bonhumoro	S.Guillot

PRI

LA

REVUO

Tre verŝajne preskaŭ ĉiuj el vi miras pri la nova aspekto de Kulturaj Kajeroj. La fakto, ke la "vestaĵo" ne ŝanĝiĝis ne signifas, ke ni volas trompi vin. Ni nur deziras ne tro rapide dekutimigi vin. La ĉefa punkto estas, ke la enhavo ne ŝanĝiĝos; ĝi eĉ pliboniĝos. Ni daŭre aperigos artikolojn divers-temajn, pri malnovaĵoj rememorigindaj kaj novaĵoj priskribindaj. Se en via urbo, regiono, lando ekzistas aŭ okazas io nekutima verku por ni artikolon aŭ sendu dokumentojn. Se vi havas originalajn ideojn aŭ talenton de rakontisto, verku por ni. Nia redakciskipo atente legos viajn "produktaĵojn".

Kial do tiu ŝanĝo de presmaniero? Tre simple pro tio, ke jam de pluraj jaroj la elspezoj superas la enspezojn. La nombro da abonantoj ne malaltiĝis sed la prezo de kompostado kaj presado ege altiĝis. Lastan jarojn,

anstataŭ plialtigi la abonprezon ni preferis aperigi nur kvar numerojn. Ĉijare, kiel daŭrigo de la financa plibonigo, ni mem kompostas kaj presas (fakte fotokopias). Granda laboro por malgranda skipo. Tiamaniere, ni esperas rapide malpezigi la malprofiton, kiun Gresillon pagis ĝis nun. Ni, ankaŭ en 1985, ne altigas la prezon de la abono.

Amikoj, Kulturaj Kajeroj pluviros se vi mem helpos nin. La abonprezo estas la plej malalta el ĉiuj abonprezoj de revuoj. Ŝajnas, ke nia revuo aperigas interesajn artikolojn ĉar multaj el vi gratulas, pluraj revuoj citas nin, aliaj petas la permeson aperigi artikolojn, kiujn ni publikigis

Pagu vian abonon regule, abonu, abonigu viajn amikojn, viajn grupojn. Ni kune transsaltos la nuntempe starantan barilon de ne sufiĉaj monrimedoj.

La Redakcia Komitato

Esperanto tra la Mondo

KONGRESOJ KAJ RENKONTOJ-

-Ekumena Esperanto-kongreso, 27|7 3|8 en Augsburg, kiel antaŭkongreso de la Universala. Adreso: Bernhard Eichkorn, Kolpingstr. 8, 7790 Messkirch F.R.Germanio.

-Internacia Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (I.L.E.I.), 22-29|7 en Kungälv (Svedio) Adreso: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 00 Hörby, Svedio.

-Internacia Semajno, 29/6-6/7 en Romans, Francio. Ekskursoj en tre bela regiono. Adreso: Grupo "Bona Stelo", 14 rue Premier 26100 Romans, Francio.

-Inter-Asocia Junulara Renkontiĝo, 16-19/5 en Clermont-Ferrand (francio). Adreso: J.F. Bouyge, 30 rue E. Chabrier, 63170 Aubière, Francio.

-Internacia Fervoja Kongreso, 17-23/5 en Vejle, Danlando.

-Pupteatra Internacia Festivalo, 23/8-4/9 en Velika-Goricq, Zagreb, Sisak (Jugoslavio). Adreso: Internacia Kultura Servo, Amruševa 5/1, 41000 Zagreb.

-Scienca Interlingvistika Simpozio, 27/4-1/5 en Varsovio. Adreso: Akademia Centro Lingvistika, RN de ZSP, ul. Ordynacka 9, 00-950 Warszawa, Pollando.

ESPERANTO EN ĈINIO-

-Oni konsideras, ke 150 000 homoj nuntempe lernas la internacian lingvon en la lando.

-Post la fondiĝo de Sciencista kaj Teknikista Esperanto-Asocio, dum lasta junio en Ĉinio, famaj sciencistoj prezentis proponon al gvidantoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj, por ke ili subtenu la laboron de la asocio. La propono interalie emfazas: "Se ni prenos esperanton, lingvon tre facile lerneblan, kiel ilon por interŝanĝi sciencojn kaj teknikojn sendube tio multege akcelos la interŝanĝojn inter Ĉinio kaj aliaj landoj kaj utilos al la modernigo de la lando."

-Kun konsento de la Eduka Ministerio, la Ŝanĥaja Fremdlingva Instituto okazigis la kvaran esperanto-kurson por instruistoj.

-Karavanoj komencas organiziĝi por la universala kongreso en Pekino, en 1986. Surloke oni planas la turismaj rondirojn

ESPERANTO-CENTRO EN JERUSALEM-

-Nun esperanto-centro en Jerusalemo volas funkcii, kiel turisma informejo. Vizitontoj al la urbo povas skribi al Jeremi Henrikson, Jekhezkel 41, 95351 Jerusalemo, Izraelio.

POR HELPI LA MOVADON EN AFRIKO-

-La speciala komisiito de UEA pri la porafrika esperanto-agado estas S-ro H. Bakker, Kastelenstraat, 231-II, 1082 EG Amsterdam, Nederlando.

FIRMAO PRI KOMPUTILAJ PROGRAMAROJ REKRUTAS ESPERANTISTOJN-

Financita de nederlanda ministerio, la firmao BSO publikigis du plenpaĝojn kaj duono en la revuo "Esperanto" por varbi: tri altnivelajn kunlaborantojn, kiuj, surbaze de esperanto, preparos pontan lingvon por aŭtomata traduko; asistanton, kiu, el la bazo de tiu sistemo, povos labori pri teknika terminologio. Cetere, la firmao BSO aperigis anglalingvan raporton pri tiuj tradukaj problemoj.

KONFERENCO "LINGVO KAJ KOMUNIKADO"-

Tiu tria jara konferenco, organizita en la nov-jorka centro de UEA far de CED (Centro de esploro kaj dokumentado pri la monda lingvo-problemo), okazis la 14-an de decembro sub la titolo: "Lingva planado je internacia nivelo", kun la ĉeesto de oficistoj de UNO kaj de universitanoj.

ESPERANTO KAJ BIBLIOTEKISTOJ-

Oni provas krei Tutmondan Esperantan Bibliotekistan Asocion (TEBA), por ligi esperantistajn bibliotekistojn kaj diskonigi esperanton pere de publikaj bibliotekoj. Skribu al: S-ro Geoffrey King, 228 Capworth street, London E10 7HL, Britio.



BONVENON

AL

KIMRUJO

Multaj homoj komencas pensi pri feriotagoj. Kial ne pasigi iom da tempo en Kimrujo ?

Antaŭ du jaroj mi kaj mia familio transloĝiĝis el meza Anglujo al Kimrujo, montara lando en okcidenta Britujo. Kial ni faris tion ? Ĉefe pro la trankvileco de la vivmaniero ĉi tie. Kvankam mi vojaĝis kun mia familio tra tuta Kimrujo, mi plej bone konas la nordan parton. Troviĝas altaj montoj ĉi tie, sed oni neniam estas longe for de golfoj kaj belaj sablostrandoj.

Mi devas ankaŭ menci, ke la facile eltrovebla historio logis min. La vivantaj lingvo kaj kulturo de Kimrujo testamentas same kiel antikvaj monumentoj pri nerompita kelta tradicio. Cetere la belsona kimra lingvo apartenas al la sama lingvo-familio kiel la bretona, sed la kimra estas iom pli vaste parolata.

Kasteloj kaj historiaj domoj abundas kaj estas viziteblaj. Plurajn konstruigis la Normandoj jam antaŭ 700 jaroj. Plie ne mankas ekzemploj pri la industria historio, ekz. ardezminejoj, lanteksejoj kaj malgrandaj trajnoj, kiuj transportis laboristojn dum la 19-a jarcento sed nun transportas feriantojn. Ĉie en Norda Kimrujo oni povas vidi indikojn pri la pasinteco. La prahistoriaj homoj postlasis defendejoj sur la montoj, dolmenoj kaj fortikaĵojn. Multaj el tiuj videblas sur la insulo Anglesey / Môn.

Ankaŭ distraĵoj estas facile troveblaj. En la kamparaj trinkejoj oni povas ofte aŭdi spontanen sed muzike altnivelan kantadon - aparte sabaton vespere. Se vi preferas kantadon pli formalan, troviĝas multaj ĥoroj konsistantaj nur el viroj. Ĉiujare en julio okazas juneca Internacia 'Eisteddfod' (Kulturifesto) en ĉarma urbeto Llangollen kaj en septembro okazas grava muzikfestivalo en Saint Asaph / Llanelwy. (Tiu lasta nomo duforma memorigas min, ke multaj kimraj urboj havas du

nomojn, kaj se, ekzemple, vi aŭte trapasos Y Felinheli kaj vidos nenium alian nomon sur ŝildoj ekster la vilaĝo, sciu ke vi atingis vilaĝon, kies nomo sur la mapo estas la malsimila Port Dinorwic!) Ĉiujare okazas Nacia Kulturifesto aŭ en la nordo aŭ en la sudo. Komence de aŭgusto 1985 okazos tiu grandega manifestacio en la nordo. Venontan paskon okazos unuafoje Brita Esperanto-Kongreso en la najbara urbo Llandudno. Se vi iom lernis la anglan lingvon ne atendu aŭdi ĝin en ĉi tiuj aranĝoj!

La dulingveco de la lando, agnoskita laŭ la leĝo kondukas al kelkaj konfliktoj. Bone organizita Societo por la Kimra Lingvo kampanjas por pliigi la rolon de la kimra en la publika vivo. Sed ne imagu, ke Kimrujo iel similas al Norda Irlando!

Mi varme rekomendas viziton al ĉi tiu negranda montara lando. La bonveno estas varma eĉ se la klimato ne ĉiam estas tia! Kolora turisma prospekto en Esperanto estas havebla de s-ro John Becker, sekretario de Esperanto-Federacio de Kimrujo, Henfryn Mill House, Pentrecwrt, LLANDYSUL, Dyfed, Kimrujo, SA44 5BB.

Hilary Chapman



La Hind-Eŭropaj Lingvoj (2)

Pro la geografia dispono de tiuj parencaj lingvoj inter Eŭropo kaj Hindio, oni decidis nomi la grupon: "Hind-eŭropa" (antaŭe oni ankaŭ diris "hind-germanaj"). Post cent jaroj da skrupulaj detalaj studoj kaj post malkovro de lingvoj, antaŭe ne konitaj, oni nuntempe atingis la jenajn rezultojn pri la hind-eŭropaj lingvoj:

oni postulas la ekziston de iu hind-eŭropa komuna pralingvo antaŭ kvar- aŭ kvin-mil jaroj;

tiu lingvo, kiun oni rekonstruis relative bone kaj precize surbaze de la lingvo-idoj, estis parolata de iu tribo, kies vivloko estas ankoraŭ ne definitive precizigita: ĉu dekstre de la montaro Uralo, ĉu pli sude, en la baseno de la rivero Danubo... Oni povas nur konjekti pri tio ĉar la donitaĵoj de la arkeologio bedaŭrinde ne ebligas precizigi la lingvon, kiun parolis la elfositaj homoj;

poste, tiu tribo formigris por trovi novajn ĉasterenojn kun pli abundaj manĝeblaĵoj. Kiam la tribo iĝis tro multnombra, ĝi nepre devis sin dividi pro manĝaĵoj. La tribo disiĝis kaj formigris en diversajn lokojn, por ke ĉiu tribero povu trovi sufiĉe da vivrimedoj. La sama procezo refariĝis kaj refariĝis ĝis kiam la tribero atingis sian nuntempan pozicion. Rilate la pralingvon, ĝi evoluis, ŝanĝiĝis, kripliĝis, riĉiĝis kaj funde transformiĝis. Post kelkaj miloj da jaroj, ĝi dividiĝis en centoj da apartaj lingvoj. Ne ĉiuj tiuj lingvoj postvivis, ĉar tribo povas malaperi.

Tiam la skribarto aperis sur nia terglobo. Tio estis fundamenta okazaĵo en la historio de la homaro. Ni ne intencas pritrakti tiun gravegan fenomenon, sed ni povas nur diri, ke por la lingvistoj la apero de la skribo estas ege grava, ĉar ĝi ebligis lasi spurojn de tre malnovaj etapoj de la lingvoj, kaj ju pli malnova estas la skribaĵo,

des pli proksima ĝi estas al la komuna hind-eŭropa pralingvo.

Sur la tereno de la skribitaj lingvoj la bildo estas tre diversa. La unua apero de hind-eŭropa lingvo troviĝas en Turkio, kie oni elfosis la arĥivojn de la Hititaj reĝoj (en la nuna vilaĝo Boghaz Köy, kiu estis antaŭe la ĉefurbo de la Hititoj-Nesitoj). Ili estis skribitaj per kojno-similaj signoj sur argilaj tabuloj poste malmoligitaj per fajro. Ili datiĝas de 1900 jaroj a.K. Male kelkaj lingvoj estas konataj nur ekde du aŭ tri jarcentoj (ekz. la unuaj du albanaj skribaĵoj datas je 1462 kaj 1496, pri la litva lingvo, 1547 estas ĝia unua apero). Tio signifas, ke oni provas kompari lingvojn, kiujn oni konas kun preskaŭ 4000 jaroj da aĝdiferenco! La problemo estas tute malfacila.

Ĝis nun ni parolis pri ĝenerallaj problemoj koncernantaj nian lingvan familion. Jen skiza prezento de la rezultoj, akiritaj post tiom da streĉa laboro. Oni kutime dividas la hind-eŭropan familion en dekunu branĉoj:

- | | |
|----------------------|---------------|
| 1- la anatola branĉo | 7- la germana |
| 2- la toĥara | 8- la balta |
| 3- la hind-irana | 9- la slava |
| 4- la greka | 10- la albana |
| 5- la itala | 11- la armena |
| 6- la kelta | (eble aliaj) |

Kelkaj el tiuj lingvoj jam delonge ne plu ekzistas, aliaj estas parolataj de granda nombro da homoj, aliaj de tre malgranda nombro, sed sur la lingvistika plano ili ĉiuj gravas kaj ĝuas la saman valoron. Ni povas nur iomete pli profunden eniri la konon de la diversaj branĉoj, unu branĉo post la alia.

1- la anatola branĉo. Ĝi malaperis sen idaj spuroj antaŭ longe. La kojnosimilaj tabletoj estis deĉifritaj en 1916 de la ĉefa lingvisto Hrozny. Antaŭ nelonge oni malkovris parton de la sekreto de la antaŭa etapo de tiuj hititaj (aŭ nesitaj) tabletoj: tio estas hieroglifaj

surŝtonaj enskriboj (hieroglifa hitita lingvo aŭ luvita). Bedaŭrinde la lingvistika kvalito de la trovitaj dokumentoj ne ĉiam estas sufiĉe bona, por ke oni povu uzi ilin fruktodone en la kompara laboro.

2- la tofara branĉo . Ankaŭ ĝi tute malaperis! Oni trovis tekstojn en la komenco de la dudeka jarcento en la nuntempa ĉina Turkeŝtano. Oni konas du variantojn de la tofara lingvo: tofara A (aŭ Agni, skribita per la brahmi skribo), kaj tofara B, aŭ kuĉea, ĉar ĝi estis parolata en la regiono Kuĉa en Sin-Kiang). Oni ne precize scias, kiam malaperis tiu branĉo.

3- la hind-irana branĉo , kun du apartigitaj subgrupoj: hinda, irana.

-la hinda subgrupo: oni konas du malnovajn variantojn: la vedan kaj la sanskritan lingvojn. La veda lingvo estis uzita en la plej malnovaj hindaj tekstoj. Ĝi estas arkaika etapo de la sanskrita. La sanskrita lingvo estas grava literatura lingvo, per kiu estis skribitaj abundaj literaturaj, religiaj kaj kleraj tekstoj. Ĝia silabaro estas ege preciza kaj donas gravegajn fonetikajn informojn pri la lingvo. Niaepoke la sanskrita naskis la modernajn hindajn lingvojn:

-okcidenta branĉo: sindhi, guĝrati, maharati, lanhda, raĝastani.

-centra: pengabi, pahari, hindi, kiu estas la unua oficiala lingvo.

-orienta: bengali, bihari, oriya.

-suda: la sri-lanka lingvo.

-aparte: la modernaj ciganaĵaj dialektoj.

-la irana subgrupo: kun tri antikvaj lingvoj:

-la malnova persa, imperia lingvo de Darius kaj Kserkso. Ĝi estas skribita per kojno-simila silabaro sur montoj kaj ŝtonoj (ĉirkaŭ 600a.K.)

-la avesta lingvo, kiu estis religia lingvo de la Mazdeanoj. Por ekkoni tiun lingvon, la franca lingvisto Anquetil-Duperron devis forŝteli rulaĵon de religiaj skribaĵoj je risko de sia vivo.

-la sogda lingvo, en la centra parto de Azio, antaŭe nomita Sogdiano. La area influo de tiu lingvo estis tre vasta: ĝis Mongolio, Ĉinio

kaj Tibeto. Ĝi estis skribita per diverstipaj elarameaj alfabetoj ekde la oka jarcento p.K. Ĝi estis forpelita de la persa lingvo kaj la unuhura nuntempa postrestaĵo estas la malnova jagnobi lingvo parolata en valo, oriente de Samarkand

El la mezepoko oni ankoraŭ konas la pehlevi lingvon, kaj oni scias pri la ekzisto de la parta, ĥotana (aŭ saka), la meda kaj scita lingvoj. La modernaj iranaj lingvoj estas multnombraj: la persia en Irano. la farsia-kabuli kaj paŝtu en Afganistano, la baluĉi en Pakistano, la pamiroj lingvoj en Hindio, la kurdaj dialektoj, la oseta lingvo en la kaŭkazaj montoj, la dardaj lingvoj...

4- la greka branĉo: (aŭ helena), kiu estis reprezentita antaŭe per pluraj bone konataj dialektoj: akeaj, eolia, doria, iona, atika. La plej arkaika formo de la greka lingvo estis trovita sur la insulo Kreto, kaj poste en Grekio mem. Oni ĝin nomas kreto-mikena linia B. John Chadwick sukcesis deĉifri la silabaron kaj la lingvon ĉirkaŭ 1950. Ekde tiu dato oni laboras sur la linia A (kiu estas la antaŭa etapo, skribita per hieroglifoj). La laboro progresas sed oni ne povas diri, ke la fina ŝtupo estas atingita. Ĉiuj nuntempaj grekaj dialektoj devenas de iu komuna normiga formo de la antikvaj dialektoj

5- la itala branĉo, kiu aparte koncernas nin, ĉar oni ofte diras, ke Esperanto estas la lasta ido de la branĉo! En la centra parto de la nuntempa Italio, oni parolis la latinan lingvon kaj ankaŭ du malpli bone konatajn: la oskan kaj la ombrian lingvojn. La lastaj du malaperis senide, sed la unua konis eksterordinaran famon, ĉar ĝi naskis la latinidajn aŭ romidajn lingvojn: la francan, okcitanan, katalunan, hispanan, portugalan, korsikan, rumanan kaj la forte apartigitajn ladinajn aŭ romanĉajn dialektojn (parolatajn en Svislando, kie ili estas la kvara ŝtatlingvo, kaj en norda Italio).

6- la kelta branĉo: la lingvo de Asterikso apartenis al tiu ĉi branĉo sed la gaŭla lingvo malaperis.

Du aliaj keltaj lingvoj malaperis antaŭ nelonge: la korna (en sudokcidenta Anglio en la 17-a jarcento), kaj la manksa (sur la insulo Man inter Anglio kaj Irlando en la komenco de nia jarcento). Ankoraŭ ekzistas: la bretona lingvo (kun tri dialektoj kaj multaj variantoj), la kimra (en Britujo, ĉirkaŭ unu miliono da parolantoj), la gaela (kun irlanda kaj skota variantoj).

7- la germana branĉo en kiu troviĝis la mortinta gota lingvo. Nuntempe al tiu ĉi grupo apartenas: la skandinava (dana, sveda, norvega kaj aparte islanda kaj farera), la germana mem, la nederlanda kaj la frisa (el kiu estas tradukitaj "La frisaj rakontoj") kaj la angla.

8- la balta branĉo, kiu estas ege arkaika kaj konservativa ĝis nun. Jam mortis la malnova prusa lingvo kaj ankoraŭ vivas du lingvoj: la litva kaj la leta, ambaŭ parolataj ĉe la bordo de la balta maro en Sovetunio.

9- la albana branĉo. La albana popolo estas tute malgranda kaj ĝi parolas du apartigitajn dialektojn: la gegan kaj la toskan. Oni trovas albanparolantojn ekster Albanio, en Jugoslavio kaj en Italio, kaj tre maldense en aliaj landoj (Usono, Sovetunio...)

10- la armena branĉo konita ekde la 5-a jarcento dank'al tradukaĵo de la Biblio. Eble ĝi estas la plej apartigita membro de la tuta familio. Oni eĉ longtempe laboris super ĝi por scii, ĉu ĝi apartenas al la hind-eŭropa familio aŭ ne. Fine la rezultoj pruvis, ke ĝi estas membro de la familio sen ombro de dubo. La modernaj dialektoj (kiuj estas multnombraj - pli ol 50) estas dividitaj en du grupojn: la orienta, parolata en Sovetunio kaj la okcidenta en orienta Turkujo.

Krom la ĉisupre menciitaj lingvoj, ekzistas ankaŭ aliaj pri kiuj oni tre malmulte scias. La malmultaj donitaĵoj nur ebligas opinii, ke ili estas membroj de la hind-eŭropaj lingvoj. Ni citu ekz.: la iliran, la trakan, la frigan, eble la etruskan kaj la liguran, kaj multajn aliajn.

Jen do la bildo de la lingva familio al kiu ni apartenas. Oni povus diri multegon pli pri tiu

temo, sed tio estus for de la kadro de tiu ĉi malgranda kaj ĝenerala prezento. Ni povas aldoni, ke la laboro farita sur la kampo de la hind-eŭropaj lingvoj servis poste kiel ekzemplo en la kompara metodo por aliaj lingvoj en la mondo: oni provis rilatigi lingvojn, rekonstrui la pralingvon de novtrovita familio. Nuntempe, oni povas diri, ke la geneologia kompara laboro estas kvazaŭ farita por la lingvoj de nia mondo. Oni tamen konstatas, ke kelkaj lingvoj staras tute izolitaj ĉar ili ne lasas sin enfamiliigi, ekz. la vaska, la japana, la korea, la buruŝaski (en Hindio).

La bildo, kiun mi prezentis estas iomete ideala, simpligita, ĉar la faktoj pri la lingvoj ne ĉiam estas tiel simplaj kaj facile interpreteblaj, kiel oni povus supozi laŭ la tiel bone ĉizitaj kategoriĵoj, kiujn ni montris. Plie, jaron post jaro, tagon post tago, oni trovas, elfosas novajn donitaĵojn, kiuj povas ŝanĝi detalojn en la bildo. Tamen la ĝenerala aspekto de la familio estas nun bone konata kaj rigida.

D. MOIRAND



**La tuta familio legas nian revuon
KULTURAJ KAJEROJ**
(listo de la perantoj sur la lasta kovril-paĝo)

La faŭno de l'pratempo

EVOLUO DE LA VIVO DE LA FLAGELULOJ AL LA GIGANTAJ SAŬROJ.

En la marĉoj jam vivis praaj ranoj. Kaj estiĝas etaj primitivaj mamuloj, evolu-historie ankoraŭ tute sensignifaj. Kontraste al ili, gigantaj bestoj vagis tra tiuj praaj pejzaĝoj, nome la Dinosauroj. Neniu animala grupo fascinas nin ja en sama grado, kiel tiuj gigantoj de l'pratempo.

Du ĉefgrupoj inter la dinosaŭroj oni povas diferencigi, nome karnovorojn kaj herbovorajn. Iliaj buŝegoj havis dentojn por maĉi plantojn aŭ por disŝiri grandajn predobestojn. Fortaj kruroj estis ekipitaj per danĝeraj ungegoj. Herbovoraj specioj, inter la reptilioj evoluis al gigantaj terbestoj, kiuj estis ĉasitaj fare de karnovoraj specioj, kiuj apenaŭ estis malpli masivaj. En ĉiuj kontinentoj de nia terglobo estas trovitaj - kaj trovataj - fosilioj de ili. Unuflanke nemirige, ĉar en tiu erao de nia planedo, la kontinentoj de l'nuntempo formis ankoraŭ unu kompleksan tutaĵon.

Unu el la popularaj dinosaŭroj estas la Brontosauro. Kvazaŭ migranta mondo el karno kaj ostoj, ĝi vagis ĉe la bordoj laŭlonge de la nord-amerikaj marĉoj en la epoko Juraso. Ĝi estas herbovora kaj atingas la konsiderindan longecon ĝis 20m. kaj pezis ĝis 30 tunoj. La kranio estis ekstreme malgranda, en evidenta kontrasto kun la masa korpo, kiun portis 4 kolonaj kruroj. La krania alveolo enhavis la relative plej etvoluman cerbon el ĉiuj vertebruloj. Sed krom ĉi tiu cerbo ĝi havis en la regiono de l'spino duan nervan centron, kiu superis pluroble la normalan cerbon je volumeno. Al la plej mirigaj saŭroj apartenas tiuj, kies korpoj estas kovritaj per fortikaj, kompaktaj karapacoj. Estas la t.n. Karapaco-dinosaŭroj, kiujn prave oni povus nomi 'vivintaj tankoj'. La plej konata kaj tipa reprezentanto inter tiuj specioj estas la Stegosauro, vivinta precipe en Norda Ameriko. Spite de l'timiga aspekto, ĉiuj karapaco-dinosaŭroj estis sendanĝeraj herbovoraj bestoj.

Tamen, certe ne tute sendanĝera por la giganta Ceratosauro estis renkontiĝo kun Stegosauroj. Tamen, ĝi ne kapablis tramordi la karapacon, sufiĉe fortikan kaj rezistopovan. Krom tio probable sufiĉus unusola forta ekbato fare de la armita vosto en la molan ventron por fortimigi la atakantojn.

Plua kontinua epoko estas la Kretacio. Ĝiaj karakterizaj trajtoj: iom-post-ioma malvarmiĝo de la klimato, marĉiĝo de maroj, unuaj floraj plantoj; kaj pri la faŭno: plua evoluo de gigantaj saŭroj, de mamuloj, de serpentoj, de birdoj.

Antaŭ 100 milionoj da jaroj en Eŭropo vivis gigantaj reptilioj, altaj 5m., longaj 10m., la Iguanodontoj. La antaŭaj membroj, mallongaj, ne taŭgis por iri, sed per la des pli fortikaj, muskolhavaj malantaŭaj kruroj certe rapida kurado aŭ anasosimila formoviĝo estis ebla. Paleontologoj supozas, ke tiuj reptilioj parte jam kapablis reguligi sian korpo-temperaturon, ke ili disponis pri haŭtglandoj kaj ke ili povis tre bone flari. Cetere, en la 'Muzeo pri Naturaj Sciencoj' en Bruselo estas ekspoziciata tuta aro da 23 Iguanodontoj. Montrilo indikas la fakon en Esperanto kaj en 4 aliaj lingvoj. Krome, en tiu epoko, la Juraso, en kiu superregis la grandaj reptilioj, vivis samtempe stranga zoologia ordo, kiu traflugis en diversaj specioj la senfinan spacon de l'aero. Estis la flugreptilioj aŭ Flugsauroj, kiel ekz. la specio de la Morfodontoj. Ili estas la unuaj vertebruloj, kiuj konkeris la aeran spacon. Ili evoluis el reptiliaj antaŭuloj. Ĉi tiu specio estas la plej antikva formo. Ĝi ja aspektas kiel timiga, vera fabela besto, trovita fosilie en Anglujo. La kranio estas longa 25cm. kaj ĝi havas akrajn pintajn dentojn. Ĝia korpa longeco estas 1,25m., ĝia flugila etendo 1,5m. Ĉiuj plantaj arboj kaj kreskaĵoj en la fantastaj 'fosiliaj' praarbaraj

pejzaĝoj havas siajn botanikajn nomojn. Inter ties arboj flugetis ankoraŭ aliaj estaĵoj kiuj, evoluistorie aŭ biologie, tute ne estis parencaj kun la flugsauroj. Estis la primaraj, efektivaj birdoj, la specio Arkeopterigo. Kiel bone videbla en la fosilio, la prabirdo havis ankoraŭ reptiliajn dentojn en la beko kaj ankoraŭ ungegojn ĉe la 2 antaŭaj membroj, inter kies 'fingroj' estis formiĝintaj veraj plumaj flugiloj. Tiu prabirdo estis la longe serĉata 'mankanta interligo' inter la specioj reptilio kaj birdo. Je la fino de tiu epoko, la Kretacio, t.e. antaŭ 65 milionj da jaroj, formortis la gigantaj sauroj sen posteuloj. Ili ekstermiĝis relative rapide kaj komplete malaperis de la tero. Per tio fermiĝis la kurteno antaŭ la lasta sceno de la Dinosaura epoko kaj estis aperta la scenejo por la mamuloj de la epoko Terciario kaj por la sekvanta evoluo de la homo.

Dum jarcentmiloj alternis, antaŭ 15 milionoj da jaroj, tropikaj, subtropikaj kaj varmetaj klimatoj. Komenciĝis en tiu epoko la Mioceno, la evoluo de la rostrbestoj, de l'praelefantoj al la nuntempaj elefantoj. Primara ekzemplo pri tiu evoluo estas la specio Dinoterio, vivinta en Eŭropo, Afriko kaj Indio. Ĝia karakteriza signo estis ke la antaŭa parto de la malsupra makzelo estis turnita preskaŭ rektangule malsupren. Sekvis Mastodonto. Ĝi vivis en Eŭropo, Azio kaj Nordameriko kaj havis 4 sveltajn, ankoraŭ mallongajn pikdentojn. En tropikaj pejzaĝoj vagas Mastodontoj kune kun pra-flamengoj. Multaj genroj evoluis en ĉiuj kontinentoj. La malsupraj puŝdentoj retroiĝis favore al la supraj, kiuj fariĝis longaj ĝis 3,6 m. Posteulo de la specio Mastodonto estis la Platibelodonto. Okulfrapaj estas la antaŭenaj ŝovel-similaj puŝdentoj, taŭgaj por fosi en la mola marĉa grundo.

Pli kaj pli ni eniras la nunan epokon, la Kvaternaron. Sekvis evolucie la Praelefanto, samtempulo de la por ĝi danĝera Smilodonto, t.n. sabro-denta pratigro, kies supraj karnoŝiraj dentoj fariĝis

longaj ĝis 30 cm. Sekvanta specio de l'tiel nomata Sud-elefanto havis ŝultran altecon de pli ol 3,5 m. Ĝi estas la antaŭulo de l'bone konata mamuto. Kun la mamuto ni venis en la lastan milionon da jaroj antaŭ la nuntempo. En tiu plej juna evolua periodo, la Kvaternaro, nia terglobo trapasis 4 glaci-epokojn, el kiuj la lasta finiĝis antaŭ nur 10 000 jaroj. Pro tio la gigantan mamuton protektis longhara felo kontraŭ la ekstreme frosta klimato, reganta dum jardekmiloj. Antaŭ ol ni finu nian promenadon tra la jarmilionoj, ni ĵetu lastan resumon rigardon returnen.

Kiam la dinosaŭroj regis dum ĉ. 140 milionoj da jaroj la teron, en ĝia ombro jam vivis la unuaj mamuloj, apenaŭ tiel grandaj, kiel musoj. Post la formorto de la sauroj, antaŭ ĉ. 65 milionoj da jaroj, sekvis relative rapida, venke impeta evoluo de la mamuloj entute. Antaŭ ĉ. 20 milionoj da jaroj la unuaj primatoj grimpis sur arbojn, kie ili relative disbranĉiĝis al multspecaj bestogrupoj, i.a. al prasimioj kaj simioj. En la praarbaroj de la Kvaternaro el la simioj estiĝis la antaŭuloj de la Homsimioj. Tiu grupo lernis la rektan iradon kaj forlasis la protekton de la arbaroj. Je ĉ. antaŭ 1 miliono da jaroj ni datas la genron 'Homo erectus'. La antaŭuloj de l'homo pli kaj pli adaptiĝis al vivado en liberaj teritorioj, kiel ekz. la genro Pitekantropo, kies fosiliojn oni trovis en Javo. Pro la rekta irado la manoj liberiĝis por fari ilojn kaj armilojn. Inter pluraj specioj de rekte irantaj primatoj postvivis tiu kun la plej rapide evoluinta cerbo, la Homo. La bone konatan genron de l'"Homo de Neandertal" sekvis nia praulo, la "Homo de Cro-Magnon". Estis tiu raso, kiu dum la lasta glaciepoko estiĝis, kies gentanoj estis samtempuloj de la krisp-hara rinocero, de la sabro-denta tigro, de la "cervo magacero", la "cervo giganta", kaj de la mamuto. I.a. estis tiuj bestoj, kiujn ĉasis la prahistoria homo kaj kiujn li eĉ pentris en siaj fame konataj kavernoj. Nu,

kiuj specioj postvivis la jarmilionojn ni povus demandi. Estis kelkaj fortaj, atakemaj, kiel ekz. la krokodiloj. Estas kelkaj bone protektataj, kiel la testudoj. Kaj estas kelkaj tre malfortaj. Sed la forto de la malfortuloj estas la kapablo adaptiĝi. Tiuj malfortuloj postvivantaj estas i.a. la papilioj, la ĉevaloj kaj ... la Homo. Nu, kiom longe ĝi post-

vivos sian "evolucion", ekz. la atombombon? Ĉu tiom longe, kiom la dinosaŭroj regis la mondon, 140 milionojn da jaroj? Cetere, pri la saŭroj eblas jena respondo: ili tute ne formortis; iliaj posteuloj ja trile pepkantas sur niaj arboj.

Hugo Röllinger



Tiranosaŭro atakas Traĥodontojn

LA AVENTUROJ DE FIFI STULTUL



PRI NIAJ LITERATURAJ TREZOROJ

Douglas P. Boatman - Se vi zorge legis la artikolon de Jopetro Danvy en la pasinta numero, mi ne dubas, ke vi vorlegis la tutan verkaron de Antono Grabowski. Bone. Gratulon al vi kaj komplimenton al la aŭtoro de tiu panegiro! Sed, nun, post la engluto de tiom altnivela verkaro, mi certas, ke vi bezonas ripozi - memripozi - (ne tro tamen, ĉar atentu: "Kiu tro ripozas, baldaŭ almozas", kiel skribis iu Z...)

Tial mi hodiaŭ ne parolos pri la patro de iu esperanta ĝenro, sed pli simple pri aŭtoro de misteraj romanoj, Douglas P. Boatman, pri kiu ĉiaspecaj gazetoj kaj enciklopedioj (kaj "et" kaj "eg"!) mistere nekomplete kaj plej ofte mise informas.

"Douglas P. Boatman (1892), optikisto, mortis en majo 1984, en Lyme Regis, Britio. Li verkis la originalajn romanojn "La nekonata konato" kaj "Kara diablino". Jen, kion mi sukcesis ekscii, parte en "Brita esperantisto", parte en "Esperanto" (tiu lasta eĉ parolas pri "polic-romano"!). En "Panoramo de Esperanta Literaturo", de Marinko Ĝivoje (1979), mi ekscias, ke komedion Boatman verkis en 1932 "Jes panjo". Sed Ĝivoje komplete preteratentas "La nekonata konato"! En "Esperanto en Perspektivo" mi ekscias, ke aperis en 1928 la novelo "Kaprico" kaj ankaŭ, ke Boatman verkis poemojn (neniu spuro en la ĵus aperinta dua eldono de la "Esperanta Antologio" de W. Auld, kio pruvus la malgravecon de ili... aŭ la neinformitecon de la aŭtoro). Strange, ĉu ne? Despli, kiam oni scias, ke Boatman estas la 12-a homo, kiu verkis originalan romanon. "La nekonata konato" estas la 22-a romano de malgranda serio, t.e. malpli ol cent ĝis nun. Eble tio ne sufiĉas tamen por ke oni daŭre memoru pri tiu aŭtoro? Konsentite... kaj ankaŭ miaj asertoj, ke "La nekonata konato" meritas atenton, certe ne influos iujn! Sed se vi legas recenzon, kiu aperis en "Bibliografia gazeto"-redaktita de K. Kalocsay - n-ro 4 de 1933, eble tiam vi, kiel mi, miros pri tiu "nekonata" (almenaŭ ne sufiĉe) romano: "...oni komencas foliumi la libron kaj oni ne formetos ĝin antaŭ plena ellego.

Tia sugesta forto, tiu nekontraŭstarebla torento de okazaĵoj, tia pliiĝanta streĉo de viziaj bildoj ekkaptas la fantazion de la leganto, kian neofte oni trovas en la poramuza literaturo... Ŝajnas al mi, ke en la ventfrappe rapida, glata, agrabla, rutina, facila stilo eble tie kaj tie ĉi troviĝas makuleto: Ŝajnas al mi, sed mi ne scias! La libro tiel forte kaptis min, mi tiel avide glutis ĝiajn paĝojn, ke mi ne povis atenti pri tio."

Ĉu konvinkitaj estas vi nun? Eĉ "makuletoj" estas foje amuzaj (dankon K.K. dank'al kiu mi devige relegas librojn kaj tiel kaptas okazaĵojn, kiujn mi preteratentis antaŭe!), ekz. pĝ 19: "Li komencis plenigi ĝin (piron) per tabako" ('stas pli agrable ol per fojno!).

Alia mistero ĉe Boatman estas la apero de lia dua romano en...1979, t.e. 47 jarojn post la unua! "Kara Diablino" eldonis TK/Stafeto, kiu cetere ankaŭ reprenis "La nakonata konato" en 1977. Sub la nomo de la verkisto estas aldonita "aŭtoro de La nekonata konato", senplie. Oni povus pensi, ke Boatman konservis tiun manuskripton en tirkesto dum tiom da jaroj; sed ne, ĉar pluraj detaloj permesas ĝin datumi (aŭ Boatman remodlis tie kaj alie ne plu aktualajn simbolojn...): televido anstataŭas radioaparaton, aŭ tiu frazo: "Ne diru, ke vi fariĝis psikema, ke vi kredas vin iu Yuri Geller!"

Laŭ W. Auld, "tro granda nombro da anglismoj en la lingvaĵo makulas tiun ĉi amuzan romanon". Mi ne scias, ĉu tiuj anglismoj kulpas, sed estas vere, ke la stilo de Boatman, kiu tiel fluis en la unua romano, iĝas fojfoje iom peza, iom "nenorma". Ĉu tio pruvus, ke Boatman distanciĝis de Esperanto dum multaj jaroj, antaŭ ol reveni, kiel plej ofte okazas, post emeriteco? Tamen, mi konsentas kun Auld, ke "tio ne rimarkeble bremsas la legadon". Vi eble rimarkis, ke mi tute ne parolis pri la temoj de tiuj du romanoj. Komprenoble mistero devas resti mistero kaj nur al malamikoj oni rakontas la finon de tiaĝenna verkaĵo. Nur bone notu, ke "amuza" kaj "poramuza" revenas sub la plumoj de Auld kaj

.....

de Kalocsay(?). Do, ne hontu amuziĝi dum kelkaj horoj dank'al tiuj dŭ romanoj, kaj se hazarde vi trovas spurojn pri aliaj verkoj de Boatman, ne hezitu skribi al mia kara ĉefredaktorino, kiu diligente aperigos viajn komplementajn informojn...

Iom kurta mia rubrik'! ja, ja! Sed kulpas nur niaj nunaj aŭtoroj, kiuj lasttempe abunde verkas. Estas pli ol kuraĝige konstati, ke la kvin lastaj jaroj proksimume 15 romanoj aperis kaj plej fidindaj fontoj (kompreneble!) multaj tiom valoraj estas aperontaj. Do, ne hezitu tuj konatiĝi kun kiaj morgaŭaj "literaturaj trezoroj". Nepre legindaj estas la romanoj de Istvan Nemere, "Le fermita urbo", "La blinda birdo", "Sur kampo granita", "Febro", "La monto", same kiel lia novelaro "La naŭa kanalo". Ne maltrafu la ĉefverkon de Lorjak "Regulus". Plonĝu vi en la krimromanon de Deck Dorval "Jaŭto veturas for...kaj veturigas la morton". Ne timu alfronti la libron de Eva Tofalvi kaj Oldrich Knichal "Kiuĵ semas plorante", kiu cerbumigos vin pri kelkaj "samideanoj"! ...Kaj ekkonatiĝu kun ĵus aperinta trezoro de nova verkistino Spomenka Stimec "Ombro sur interna pejzaĝo". Pri tiu lasta romano, du valoraj recenzoj aperis en "L'Esperanto", de Michel Duc-Goninaz, kaj en "La Kancerkliniko-33", de Georgo Lagrange. Post niaj poetoj kaj niaj novelistoj, jen nova erao, tiu de niaj romanistoj. Almenaŭ pro ili (aŭ dank'al ?) mi ne plu emus kabeigi!

Jak LE PUIL



LASTATEMPE

APERIS

"La Robaioj". Reeldono de la traduko de la versoj de la persa klasikulo Umar Kajjam far Waringhien.

"La Morto kaj la morto de Kinkas Akvobleko". Traduko de la libro de la brazila verkisto Jorge Amado.

"Lasu min paroli plu!". Lingvoinstrua romano de Claude Piron.

"La prezo de la elaĉetado". Religia verko, tradukita el la bretona lingvo, kiu rakontas la vivon de Jesuo. De Erwan ar Menga.

"La ora pozidono". Mallonga romano de Julian Modest (originala).

"La suferoj de la juna Werther". La fama verko de Goethe tradukita de R. Haupenthal.

"Retoj". Dudek popularaj artikoloj pri komputilaj informretoj.

"Eŭlalia". Nova originala romano de Lorjak.

"La mondo de Tibor Sekelj". Kvin miniaturaj binditaj volumoj pri la kvin kontinentoj, kun 700 lignogravuraĵoj!

El "Anatol". Kvin unuaktaĵoj de la aŭstra verkisto Artur Schnitzler en Vieno fine de la lasta jarcento.

"Scienca Interlingvistika simpozio". 14 kontribuaĵoj el varsovia simpozio.

"Komunlingvaj nomoj de plantoj de nord-okcidenta Eŭropo", de Wouter F. Pilger.

Por la franc-lingvanoj

"Proverbaro franca-esperanta kaj esprimoj sankciitaj de l'uzado".

"Laŭ la fluo de l'interparolo", konversacia gvidlibro, dulingva.

Ambaŭ libroj verkis nia amiko Lucien Bourgois.

"Preparado al la Atesto pri Kapableco", 3-a eldono de la tre utila lernilo de André Ribot.

POR VIA DISTRO

NOVA PROBLEMO

KASKADO de VORTOJ

Vi trovos la duan vorton per ŝanĝo de iu litero de la unua vorto, la trian vorton per ŝanĝo de iu litero de la dua vorto, k.t.p., ĝis la lasta vorto. La listo de la klarig-vortoj aŭ frazoj respondas al la sinsekvo de la trovotaj vortoj. Por helpi vin ni donas la unuan kaj ankaŭ la lastan vortojn.

- 1- Fari
- 2- Malhelpi la iradon
- 3- Fari patruon
- 4- Varmiĝi
- 5- Plenumi funkcion
- 6- Karaktero de aktoro
- 7- Eksternavena parto de maro
- 8- Centra punkto en problemo
- 9- Distingilo de estaĵo
- 10- Ebligas klaran komprenon
- 11- Malpurigaĵo
- 12- Taĉmento da soldatoj
- 13- Ceremoniaro
- 14- Marĉa herbo
- 15- Legumenaco
- 16- Frukto bongusta
- 17- Kunaĵo el estuloj
- 18- Vivrimedo
- 19- Senvosta vertebrulo
- 20- Kuntrinkada bondeziro
- 21- Kapablo ĝuste juĝi
- 22- Prudenta
- 23- Pike sprita
- 24- Ne distingebla
- 25- Estinta
- 26- Ekvilibro-manka
- 27- Tedita de iu okupo
- 28- Ripozbezono
- 29- Bonakorde
- 30- Paco

SOLVO DE LA ANTAŬA ENIGMO :

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1	M	A	L	E	S	P	E	R	I
2	A	B	E	L	A		T	E	Z
3	L	O	G	O	G	R	I	F	O
4	A	M	O		O		K	A	L
5	S	E	M	O		I	E	L	E
6	I	N	O	C	E	N	T	O	
7	D	I		E	L	D	O	N	I
8	U		P	A	F	I		T	A
9	A	V	A	N	O		J	A	M
10	J	I	D	O		G	A	J	A

ĈU RIDINDE ?

Sur la kvietaj bordo de ĉarma rivereto fiŝkaptanto provas taŭzeti plotojn. Promenanto haltas malantaŭ li. Unu horo pasas; neniu parolo ĝenas la natur-bruojn, neniu fiŝo sin anoncas. Du horoj, tri horoj pasas: neniu fiŝo; la du viroj restas tiel senmovaj, kiel la flosaĵo. "Ankaŭ vi ŝatas fiŝkapti?", diras la ploto-taŭzanto. "Tute ne", respondas la promenanto. "Mi ne estas sufiĉe pacienca".

-Antaŭ ol sidi en la tribunalo la akuzito flustras al sia advokato: "Se mi estas kondamnita je nur dudek jaroj en karcero, mi donos al vi dek milionojn da frankoj." La proceso disvolviĝas kaj je la fino la akuzito ricevas punon de dudek jaroj en karcero. Promeso plenumata: li donas dudek milionojn da frankoj al la advokato. Tiu ĉi dankas kaj daŭrigas: "Ne facile! Mi devis multe barakti. Ili volis absolvi vin!".

GRAMATIKO PER BONHUMORO

ADVERBIGO DE LA PREPOZICIOJ
PER ALDONO DE LA FINAĴO E

apud(e) — ekster(e) — kontraŭ(e) — kun(e)
per(e) — post(e) — sub(e)

RIM **Prepozicio** akompanas substantivon (aŭ pronomon)
Adverbo akompanas verbon (adjektivon aŭ adverb-
on)

- EKZ** — sidi apud tablo -li starigis la botojn apude de siaj.
— stari antaŭ arbo -li staris post ni ; antaŭe komen-
cu kaj poste kontrolu.
— kiu ne estas kontraŭ vi, kun vi estas — ili foriris kune.
— ili sidiĝis unu kontraŭ la alia — la vento blovis kontraŭe.
— dum la parolado li dormis ; dume la aliaj babilis.

RIMARKO N montras **almovon** :

- vidu la arbon,, li sin kaŝas malantaŭe ; ŝi kuris malantaŭen.
— mi haltis ; la aliaj trotis antaŭen.
— ekstere okazis bruo ; ili kuris eksteren.
— li falis sub la radojn ; la hundo vidis la tablon kaj kaŝiĝis suben.

Cu halucinio ?




Ni imagu : subite, dum tuta tago, la speguloj spegulas ĉiujn niajn plej sekretajn malvirtojn. Jam de la ellitiĝo, en la banĉambro ; apude la lito, antaŭ la spegul-ŝranko. Ekster jen la retrospegulo de la aŭtomobilo. Kaj kio okazas, se tuta familio haltas kune antaŭ la montrofenestroj de la magazenoj ? Kaj se geamantoj rigardas sin profunden en la okuloj, speguloj del'koro ? Kaj se la rivero spegulas ĉiujn, kiujn, antaŭ ni sin rigardis en la akvo.

Cu malbonaj okulvitroj ?



Ĉefo, vidu kion diras la komputero ! Poste kelkaj hezitaj mi frapis tien kaj ĉi tien la klavoj, por ke la aparato registru miajn proprajn donitaĵojn. Kaj poste, finfine venas la respondon.

Noktaj misteroj.



Ha, mia kara panjo, trankviliĝu. Mi certe pasos tute bonan nokton. Poste tiu telefonado, mi turniĝos al tute interesan bildlibron : floroj, virinoj, anatomio. Kaj eble, antaŭ ol endormiĝi mi lasos min forrevi plej fantazie...

— Apud — ekstere — kiuj.
— Post — klavojn — respondo.
— Pasigos — post — interesa bildlibro.

KOREKTOJ :

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (200 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (400 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (5,00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (75 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (50 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10° - D ALICANTE - (1 100 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiōzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Aurorastraat, 5631 KK EINDHOVEN, ZH, pĉk. 209721 (24 guld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bøe Marmarvn 2A Oslo 11 (55 kr.).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).

Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (55 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Weno nah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Kulturaj Kajeroj a changé de visage sous la pression des évènements. Grésillon, cette année, aura peu changé, également sous la pression des évènements. L'hiver, rude comme en beaucoup d'autres lieux, a laissé quelques traces. Un bon aspect de la froidure cependant: ne pouvant pas travailler à l'extérieur les artisans sont venus plus tôt que prévu et l'escalier avait fait peau neuve fin janvier. Le règlement n'a pas posé de gros problème, le financement ayant été bien entendu prévu, mais aussi grâce à quelques généreux amis dont les dons ou reports de remboursement nous ont permis de respirer plus librement. Qu'ils en soient tous à nouveau remerciés.

La situation du jardinier n'est pas encore tout à fait claire, bien que une solution soit peut être en vue qui nous éviterait de grosses dépenses. Le Conseil d'Administration, réuni début décembre, avait pris toutes dispositions pour faire face à ces dépenses. Cela ne réglera pas le problème de l'entretien de la propriété assuré précédemment par un fermier qui ne veut plus faire ce travail. Nous recherchons une solution acceptable également financièrement.

Nous avons craint que l'augmentation de nos tarifs ait un effet dissuasif sur nos amis. Nous ne pouvons pas encore dire qu'il n'en est rien, mais depuis le

15 janvier nous avons refusé des chambres particulières pour la première période de juillet, comme les années passées. Ce n'est qu'en avril que nous pourrons vraiment faire des comparaisons avec les saisons antérieures. Le 15 février nous avons une cinquantaine d'inscriptions pour la semaine internationale des enfants. pour les autres périodes il est trop tôt pour faire des pronostics d'autant plus que nous risquons d'avoir un "trou" pendant la Congrès de Augsburg.

Autre activité de l'hiver, la 3ème édition du Manuel de Préparation au Kapableco de A. Ribot. Epuisé depuis longtemps ce manuel nous était souvent demandé. La 3ème édition a été allégée de documents qui n'étaient plus d'actualité et quelques textes proposés à la traduction ont été changés. Ce manuel correspondra mieux ainsi aux exigences actuelles de l'examen. Madame Vincent a tapé tout le texte (56 pages) et le photocopieur a fait le reste.

Il n'est pas permis de s'engourdir pendant l'hiver. Nous n'en goûterons pas moins l'été, surtout l'été à Grésillon. Vous aussi vous le goûterez mais hâtez vous de vous inscrire!

P. Babin

Jus alvenis la malĝojiga informo, ke nia granda amiko Henri BENAIM forpasis la 28-an de februaro. Al lia edzino kaj tuta familio ni sendas nian koran kondolencan.

NOS PEINES: Yvonne MARTINOT nous a quittés. Malgré les souffrances que la vie ne lui a pas épargnées, militante de tous les mouvements généreux, elle laisse une trace profonde, matérielle dans bien des organisations, morale dans bien des esprits, sentimentale dans bien des cœurs. Nombreux sont ceux qui la pleurent.

GRAND SUCCES

de la quatrième édition de

POR LA PRAKTIKANTOJ

de P. BABIN

Illustré par L. Poueymarie.

« *Vigla lernolibro por la praktikanto* »

Prix inchangé : **25 F.** — Rabais habituel
aux groupes et aux Libro-Servoj.

Commandes à : J. Vincent, B.P. 54,
49150 Baugé.

VOUS NE POUVEZ PAS

suivre un cours oral dans votre ville ?

Pourquoi ne pas essayer nos

COURS PAR CORRESPONDANCE

POUR LES DEBUTANTS : 16 leçons illustrées avec de nombreux exercices. Permet d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : **120 F.**

COURS DE PRATIQUE : 14 leçons illustrées. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : **120 F.**

NIVEAU SUPERIEUR : versions, thèmes, études de textes ; histoire de l'espéranto et du mouvement espérantiste. Cours et corrections : **90 F.** Notre Libro-Servo peut fournir les livres qui vous manquent.

★

Inscriptions et chèques à : Maison Culturelle Espérantiste, 49150 Baugé —
C.C.P. Nantes 1485-39 P.

LIBRO - SERVO

Notre catalogue est à votre disposition. Nous vous le ferons parvenir contre un timbre-poste. Nous pouvons vous fournir tous les livres non épuisés et toutes les nouveautés.

Faites vos commandes sur lettre de préférence. Si vous êtes sûr du montant de la commande, joignez un chèque. Sinon attendez la facture qui sera jointe à l'envoi.

N'oubliez pas que les envois se font **franco au-dessus de 200 francs.**

Adressez vos commandes à : J. VINCENT, B.P. 54, 49150 Baugé.

Intitulé des chèques : Maison Culturelle Espérantiste.

JUS REELDONITA!

Preparado al la Atesto pri Kapableco

de A. RIBOT

3-a eldono reviziita

prezo: 30 f.f.